

N-ro 169 printempo 2020

ISSN-1565 3315

ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

EN LA NUMERO GASTAS:



DINA RUBINA
Israelo

Unu el la plej famaj kaj sukcesaj
verkistinoj en la rusa



PETRO PALIVODA
Ukrainio

Poeto, tradukisto de 4 lingvoj



LENKE SZASZ
Rumanio

Poetino, verkistino



RENATO CORSETTI
Grandbritio

Longjara Prezidanto de UEA

La redaktoro
Mikaelo Lineckij

La reviziantoj:
Gabi Zeevi (Israelo)
Andreo Peçonkin (Rusio)

ELI-Prezidanto
Jehoŝua Tilleman

La redakcia adreso: P.O.K. 22041, 61220 Tel-Avivo



Karaj legantoj!

Ĉi numero de IsEs devus esti disdonita en la IK-21 kaj poste dissendita al la abonantoj, sed la aferon intervenis la virusa pandemio... Estis fuŝitaj multaj aferoj en la mondo, nia Kongreso estas transmetita al 2021. Artikolo pri sanstato en la mondo far Amri Wandel estis kelkfoje aktualigita. Estas ŝanĝitaj ankoraŭ kelkaj materialoj, kiuj malaktualiĝis... Sed, feliĉe, ni vivas plu! Kaj tio gravas!!!

La retejo:
<http://esperanto.org.il/ie.html>

La enpaĝigo:
Mikaelo Lineckij
mikaelo@esperanto.org.il

Abontarifo eksterlanda:
10 eŭroj. Eblas pagi per UEA al la konto elia-q aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.

La enhavo:

Monda danĝero <i>Amri Wandel</i>	3
Gazetara komuniko de UEA	9
Zamenhof-vespero <i>Eran Yuval</i>	9
Dina Rubina <i>Mikaelo Bronŝtejn</i> ...	11
Historio - DLT <i>Renato Corsetti</i>	12
Atenco en Klajpeda <i>Norman Berdiĉevski</i>	13
Kontribuo de ukrainianoj <i>trad. Mikaelo Lineckij</i>	16
LitSupO. Poeto, tradukisto de 4 lingvoj <i>Petro Palivoda</i>	23
Ankaŭ tiel povas okazi <i>Traduko de Mikaelo Lineckij</i>	24
Pri Davido kaj Salomono <i>trad. Luiza Karlol</i>	25
La meveno <i>Lenke SZÁSZ</i>	26
Testo <i>Traduko de Milaelo Lineckij</i>	28



Mia romano kun la Korona Viruso

Amri Wandel

Kiel nomi la viruson?

Mia rilato al la koronavirusa pandemio komenciĝis per Esperanto. Komence de februaro ka Konsultejo de la Akademio de Esperanto ricevis demandon, kiel nomi la novan viruson. Post longa diskuto ni rekomendis du variantojn KORONviruso kaj KRONviruso (tiu familio de virusoj estis nomita coronavirus laŭ ĝia aspekto en elektrona mikroskopo, kiu similas al la suna korono aŭ al krono, ambaŭ estas "korona" en la latina). Mi uzas la unuan, laŭeble en la formo "korona viruso" kiu havas la avantaĝon, ke ĝi tre similas al la internacie uzata formo "coronavirus". Iuj pledas por la radika formo "koronaviruso", kiun la Akademio tamen ne rekomendis. Interesa artikolo kaj sekva diskuto pri la nomo de la viruso en Esperanto aperas en la retejo :

<https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/kiel-nomi-tiun-viruson/>



Prokrasto de la Israela Kongreso

Komence de februaro 2020 la epidemio ankoraŭ ŝajnis esti loka problemo de Ĉinio. Neniu antaŭvidis ke ĝi fariĝos pandemio kaj kaŭzos la nuligon de ĉiuj kunvenoj, sed sufiĉe baldaŭ Israelo kaj aliaj landoj li-migis la flugojn kaj devigis la alvenantojn eniri dusemajnan kvarantenon. Sekve oni limigis kunvenojn, unue pli ol 500, sekve 100, kaj fine entute. Evidentiĝis ke ni devos nuligi la Israelan Kongreson en Tel Avivo, planita por la komenco de aprilo. Tio estis tre bedaŭrinda, ĉar aliĝis rekorda nombro (pli ol 70, el ili ĉ. 25 eksterlandanoj el pli ol dek landoj). Mi ekhavis ideon: anstataŭ nuligi simple prokrasti la Kongreson je unu jaro. Tio garantios ke la aliĝintoj povos ricevi la samajn feritagojn, sezonon kaj ekskursojn. Efektive, preskaŭ ĉiuj eksterlandaj aliĝintoj kaj ĉiuj israelaj decidis partopreni venont-

jare. La evoluon de la epidemio mi akompanis en la nova rubriko “Fake, Science, Profesie tra la mondo”, ekde la marta n-ro de Esperanto, kaj ekde la komenco de februaro ankaŭ per semajnaj raportoj en la Face-book-paĝo de UEA. En la afiŝo de la 22an de marto mi skribis “De mia antaŭa raporto pasis apenaŭ unu semajno, sed ŝajnas ke la mondo renversiĝis. En Ĉinio la epidemio efektive finiĝis, sed en la tuta mondo la nombro de infektitoj estas jam trioble tiu de Ĉinio kaj la nombro de mortintoj - kvaroble. Neniu povis tiam imagi, ke dum unu monato kaj duono tiuj nombroj kreskos kvindekoble. Por sekvi la rapide ŝanĝiĝantan situacion, mi lanĉis kaj daŭre ĝisdatis la retpaĝon (kiu lastatempe fariĝis paĝaro) https://revuoesperanto.org/korona_viruso. En ĝi oni povas sekvi la ĝeneralan staton de la epidemio, kiel ĝiajn implicojn en Esperantujo.

Virtuala Kongreso anstataŭ la UK

La sekva defio estis la Universala Kongreso. Ĉu ĝis aŭgusto la krizo pasos? La Estraro de UEA zorge sekvis la situacion. En februaro la UK ankoraŭ aspektis sufiĉe for por esperi ĝin okazigi kiel planite. Por tamen helpi al la kongresanoj en tiu necerta situacio, meze de marto UEA prokrastis la limdaton por mendoj je unu monato, ĝis la 1a de majo, kun la espero ke ĝis tiam la situacio fariĝos pli klara (uea.org/gk/855a1). Tamen, malpli ol du semajnoj poste Kanado fermis siajn limojn kaj montriĝis ke la kongreso en Montrealo ne povos okazi. Komence de aprilo UEA komunikis pri la intenco prokrasti la kongreson (<https://uea.org/gk/861a1>) al la jaro 2022 (<https://uea.org/gk/862a1>).

Paralele al la nuligo de la ĉeesta Kongreso en Montrealo, la Estraro de UEA komencis plani alternativan virtualan eventon, kiel UEA komunikis meze de aprilo: “La Virtuala Kongreso (VK) estas planata por la komenco de aŭgusto kaj provos reprodukti la esencajn elementojn de la UK, tamen en nova virtuala formato, kaj samtempe enkonduki novajn ideojn”. Evidente, tio estas enorma tasko, neniam



antaŭe realigita aŭ eĉ imagita en Esperantujo, kiu bezonas zorgan kaj tre seriozan preparadon.

MondaFest' 2020

La virtuala evento planata de UEA ne nur anstataŭu la Universalan Kongreson, sed proponu al la E-komunumo ion novan, kiu povos resti ankaŭ estonte.


Dum la (nordhemisfera) somero okazos trimonata E-festivalo "MondaFest' 2020, kiu komenciĝos per la SOMERA inaŭguro la 20-an de junio-20 kaj ligos abundon da virtualaj E-aranĝoj, kiel koncertoj, konferencoj (ekzemple de ILEI kaj UMEA) kaj kongresaj eventoj kiel Movada Foiro kaj virtualaj ekskursoj. Ĝia kulmino estos la Virtuala Kongreso dum la unua semajno de aŭgusto, kiu provos virtuale reprodukti la esencajn elementojn de la Universala Kongreso, tamen en nova formato. Ekzemple: anstataŭ la Nacia Vespere okazos Internacia Arta Aranĝo, anstataŭ la bankedo - Kunmanĝado tra la Mondo (virtuala prezentado de naciaj pladoj), la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato okazos per Zoom kaj eĉ la IKU-libro estos virtuale havebla senpage. La ekskursita tago okazos virtuale, tiel ke oni povos elekti ekskursojn ĉiĉeronitajn de spertaj lokaj e-istoj en la plej turismaj lokoj de la mondo. Eĉ la aŭkcio okazos virtuale.

Tutmonda evoluo de la epidemio

Eĉ skribante tiujn ĉi liniojn, malgraŭ iom-post-ioma malpliigo de la tagaj nombroj de la infektitoj kaj mortintoj en pluraj landoj, la pandemio ankoraŭ hurlas tutmonde, aparte en Usono kaj en Sudameriko. Kelkaj landoj komencas singardan leviĝon de la enfermo, kiu preskaŭ haltigis la ekonomion tutmonde, sed daŭros ankoraŭ longe ĝis la vivo renormaliĝos, kaj verŝajne la postviroza epoko signife diferencos de la antaŭa en multaj terenoj.

Komence de julio la nombro de konfirmitaj infektitoj tutmonde pasis dek milionojn, kaj la nombro de mortintoj pasis duonmilionon. La grafikaĵo montras la evoluon de la taga nombro de novaj infektitoj en diversaj kontinentoj. En Eŭropo la epidemio kulminis komence de aprilo kun 35,000 novaj infektitoj tage, de tiam malrapide ŝrumpis kaj de majo troviĝas ĉ. 15,000 tage. Kontraŭe, en Nordameri-

ko, dum junio la taga nombro saltis ĝis sesdek mil infektitoj tage (80% el tio en Usono), kaj same Suda Ameriko, 75% de tio en Brazilo. En Azio, kie la epidemio komenciĝis (en Ĉinio), la nombro rekomencis kreski en marto kaj komence de Julio atingis 50,000 tage, duono el tio en Barato.



Post la viruso: en la mondon venas nova sento

Dum la koronavirusa pandemio pli kaj pli evidentiĝas ke la mondo profunde kaj verŝajne senrevene ŝanĝiĝis. La novan realecon eblas simbole retrovi en la Zamenhofaj versoj de La Espero. Nova sento por la homaro, sed ankaŭ por Esperanto, kiel diskutite en la virtuala seminario AMO-64 (https://revuoesperanto.org/korona_viruso_amo64). La mian, “La viruso kaj Esperanto” mi finis per la aŭguro ke:



- Homoj fariĝos pli toleremaj, kunlaboremaj, paciencaj, kaj lernos pli aprezi la sanon, la medion, la vivon.
- Plivastiĝos reta studado kaj retaj kursoj, inkluzive de Esperanto-kursoj kiel Duolingo.
- Internaciaj kontaktoj pli vaste okazos per la retaj rimedoj, okazos pli da virtualaj kunvenoj, naciaj kaj internaciaj.
- Ankaŭ niaj Esperanto-kunvenoj kaj kongresoj parte okazos ankaŭ virtuale. Eble estonte niaj Universalaj Kongresoj fariĝos hibridaj: modeste ĉeestaj, amase virtualaj!

Tiun tendencon ni povas vidi jam nun: pro la epidemio multaj kunvenoj okazas virtuale. Ekzemple, anstatutĉ la klubaj kunvenoj okazis ĉiu-semajne la Israela virtuala E-kunvenoj (IVEK) per Zoom.

Korona Virusoj kaj Esperanto

Prof. Amri Wandel
Univ. de Jerusalemo
Estraro de UEA

AMO 64 8.5.2020



Ankaŭ la tradicia Malferma Tago (MT) en la Centra Oficejo de UEA okazis virtuale fine de aprilo. Ĝi estis la plej amase vizitata kaj la plej internacia MT, kun pli ol 120 partoprenantoj el dekoj da landoj. Same multajn reagojn ricevis la MT-raporto en la Facebook-paĝo de UEA, kiun mi finis per la vortoj: “Montriĝas ke la pandemio donas ankaŭ pozitivan novan dimension al Esperanto: virtualaj kunvenoj kiuj ebligas la partoprenon al multaj kiuj antaŭe povus nur revii pri tio.” Bele emfazis tion pluraj komentoj de partoprenantoj. Ekzemple, Ilia el Indonezio skribis: “Estas mia unua Malferma Tago! Dankon al ĉiuj kiuj jam ebligis tion al ni, kiuj ankoraŭ ne povas veni al MT en CO”. La lastatempaj grandskalaj virtualaj aranĝoj de UEA estas la tago de Meza Oriento kaj Norda Afriko, kiun mi organizis la 4.7.20 (https://www.youtube.com/watch?v=7zYINCCpC_o) kaj la Virtuala Kongreso okazonta la 1-8.8.20 (uea.org/gk/890a1).

La korona viruso klare demonstris la staton de “tutgloba vilaĝo”: la epidemio komenciĝis en nekonata ĉina provinco, Hubei, kaj unue estis konsiderata loka problemo. Komence de februaro UEA sendis subtenmesaĝon al la ĉinaj esperantistoj. Unu monaton poste la Monda Organizaĵo de Sano deklaris ĝin pandemio, kaj meze de marto jam evidentiĝis ke la UK en Montrealo ne povos okazi kiel planite. Sekve,

interkonsente kun la kongresejo kaj la LKK, la Estraro anoncis la decidon prokrasti la Montrealan Kongreson al la jaro 2022.

Kelkajn ideojn pri la planita virtuala evento anstataŭ la UK mi rakontis en intervjuo ĉe Ĉina Radio Internacia, komence de aprilo (<http://esperanto.cri.cn/2521/2020/04/11/180s210159.htm>). Kiel dirite, ĝi konsistos el du elementoj: Virtuala Kongreso kiu daŭros ĉ. unu semajnon kaj enhavos plurajn erojn de la tradicia UK (ekzemple la Internacia Kongresa Universitato), kaj pli longdaŭra, trimonata festivalo, kadre de kiu okazos pluraj eventoj: ĉu virtualaj versioj de konataj Esperanto-kunvenoj kiel la Virtuala E-Konferenco de ILEI (VEKI), ĉu artaj programoj kaj koncertoj elsendotaj rete, kiuj povos logi ankaŭ ne esperantistojn, demonstrante la Esperanto-kulturon kaj muzikon internacie, pli vaste ol iam antaŭe.

Oni povas do kompletigi la verson en la titolo: En la mondon venis nova sento, tra la mondo iras forta voko: per flugiloj de la interreto, nun de UK iros ĝi al VK!

Sekve oni povas antaŭvidi fundan restrukturigon de niaj estontaj Kongresoj kaj renkontiĝoj, provizante la eblecon partopreni virtuale ankaŭ en ĉeestaj kongresoj. Tiun avantaĝon povos profiti miloj da samideanoj, kiuj antaŭe ne povis partopreni Universalajn Kongresojn pro ekonomiaj kialoj. Sur malpli granda skalo tion jam demonstris la virtuala Malferma Tago (uea.org/gk/866a1). Eventuale la estontaj kongresoj estos hibridaj: kaj ĉeestaj kaj virtualaj, konservante la senperan, personan interhoman renkontan kontakton inter esperantistoj, kiel okazas en la tradiciaj Universalaj Kongresoj ekde 1905, sed aldonante la internacian, tutmondan dimension de la interreto, kiun niaj prauloj apenaŭ povus imagi. Tiel la konata zamenhofa esprimo povos akiri novan, pli vastan sencon: "...sed homoj kun homoj – kuneste kaj virtuale".

Daŭre validas la vortoj kiujn mi skribis komence de aprilo en la komuniko pri la prokrasto de la UK: "Por la tuta homaro tio estas tre malfacila tempo, sed ni memoru, ke ni renkontas tiun ĉi epidemion en multe pli favoraj cirkonstancoj ol estis en antaŭaj historiaj pandemioj. Ni havas modernajn servojn, medicinon, komunikadon, interreton.

La koronviroza epidemio estas la plej severa de jarcento, sed fine ĝi estos venkita. Tiam la homaro, la socio kaj ankaŭ la Esperanto-

komunumo havos ŝancon pliboniĝi. Espereble, kiam pasos la krizo, oni daŭre plu respektos, simpatios kaj estos pli pacienca kun la aliaj, loke kaj internacie. Ni estu pli modestaj, aprezemaj kaj konservemaj al nia socio, kulturo, medio kaj planedo.

Ankaŭ la Esperanto-Movado povos lerni de tiu historia kaj socia leciono: per retaj rimedoj kiel Skype, Zoom, Facebook k.a. havi pli da interretaj kontaktoj nacie kaj internacie, dividi niajn renkontiĝojn kaj kongresojn kun esperantistoj kaj ne esperantistoj tra la tuta mondo kaj tiel disvastigi la konon kaj la mesaĝon de la Internacia lingvo Esperanto”.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 844 2020-01-23

DEKLARO DE UEA OKAZE DE LA 75-A INTERNACIA DATREVENO POR LA HOLOKAŬSTO, 27 JANUARO 2020

Hodiaŭ, kiam 50 ŝtatgvidantoj kaj delegacioj de la tuta mondo kunvenas en Jad Vaŝem por mencii la 75-an datrevenon de la liberigo de Auschwitz kaj la viktimojn de la Holokaŭsto, UEA omaĝas al la memoro de la milionoj kiuj estis mortigitaj pro sia genta aparteno kaj religio, inter ili ankaŭ multaj esperantistoj inkluzive de familianoj Zamenhof. En tiu tago, kiun la internacia komunumo mencias en la dato kiam estis liberigita la ekstermejo Auschwitz, oni memoru la pasintecon kun instruo por la estonteco, ke neniam plu homoj estu persekutataj pro sia religia, genta aŭ kultura aparteno kaj la homaro atente respektu la homajn rajtojn je libereco, interalie de kredo kaj lingvo.

GRAVA EVENTO EN VIVO DE ISRAELAJ ESPERANTISTOJ


Eran YUVAL

Kutime tra la mondo esperantistoj havas tradicion festi la naskiĝtagon de Zamenhof. Ankaŭ en Israelo, estas longa tradicio de renkontiĝoj kiuj nomiĝas ‘Zamenhofa Vespere’. Ĝi okazas ĉirkaŭ la dato de la naskiĝtago de Dr. Esperanto, kiu alvenis al la mondo je la 15a de decembro 1859.

Ĉi jare Israela Movado renkontiĝis en Tel-Aviv vespere



de la 10-a de decembro. Kiel kutime, pri la renkontiĝo kaj la programo respondecis kaj majstris sinjorino Matilda Landaŭ.



Proksimume 40 samideanoj ĉeestis la Zamenhof-feston. Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare, inter la ĉeestantoj estis kelkaj eksteraj gastoj kiuj dum la lastjaroj alvenas dank' al la retejo de ELI aŭ dank' al la Facebooka paĝo. La distra programo komenciĝis per klasika pola muziko - pianludita de Doron.

Sekvis prelego de Eran en la hebrea, rilate al Zamenhof kaj al Aleksander Bain la inventisto de la faks-maŝino. En la programo estis ankaŭ Esperantaj kantoj far Enrica, eŭritmia anekdoto pri "Hallelujah" prezentita de Tali kaj Mikaelo, hebrea kanto "Balado al virino" esperantigita talente de Amir kaj kantita belege de Israela. La du kantaj programeroj almenaŭ miaopinie estis belegaj kaj elstara parto de la vespero.

Post la paŭzo Mikaelo prezentis la raporton de la prezidanto Amri (kiu ne povis mem ĉeesti ĉi-foje) pri la agado de ELI, prezidantan adiaŭon kaj prelegon pri la nepo de Zamenhof kiu forpasis du monatojn antaŭe. Omaĝe al la nepo de Zamenhof, Amri preparis belegan prezentaĵon, kiu montris la nepon, iomete la edzinon kaj lian familion, pri la renkontiĝoj de Amri kun la nepo Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, kaj la nepa familio. La unua renkontiĝo okazis en la jaro 1993 okaze de kunlabora restado en astronomia centro apud Parizo, post la UK en Valencio. La nepo sendube estas eminenta figuro en Esperantujo, kiu certe meritas apartan artikolon.



La dua parto de la vespero estis la oficiala parto, ĝi estis la 2019 jara ĝenerala asembleo de la asocio, en kiu estas dis-kuto pri la jara agado, libera diskuto pri la oficialaj aferoj de la Israela Movado, kaj la nova estra-ro de ELI estis elektata pere de la membroj de la Israela Esperanta asocio.

Interalie la ĝisnuna prezidanto Amri Wandel anoncis sian decidon ne plu esti la prezidanto de ELI. Amri jam antaŭe klarigis la deziron "Post mia 11 jara servo kiel prezidanto, mi decidis en 2020 ne plu kandidatiĝi. La ĉefa kialo estas mia elekto kiel estrarano de UEA,

kiu postulas multe pli da tempo. Plia kialo estas la bezono renoviĝi kaj varii. Mi tamen plu plenumos la taskojn de reprezentanto de ELI en la Komitato de UEA kaj organizado de la Israela Kongreso”.

ELSTARA VERKISTINO DINA RUBINA – NUN ANKAŬ EN ESPERANTO

Mikaelo BRONŜTEJN



Dina Rubina estas unu el la plej famaj nuntempaj verkistoj, kreantaj siajn verkojn en la rusa lingvo.

Ŝi naskiĝis en Taŝkento, la ĉefurbo de Uzbekio. Tie, krom la kutima klero ŝi ricevis ankaŭ la muzikan, finstudinte en la speciala lernejo por talentaj infanoj kaj poste en la konservatorio. La unua novelo de Dina Rubina estis publikigita,

kiam la aŭtorino havis nur 16 jarojn. Ĝi aperis en la plej grava sovetia junulara revuo “Junostj” (Juneco) kun la eldonkvanto 3 milionoj da ekzempleroj.

Ekde tiam venis de sub ŝia plumo dek romanoj, amaso da noveloj kaj eseoj. Surbaze de ŝiaj verkoj en Rusio estis kreitaj ok kinofilmoj kaj seriaroj, du el tiuj ricevis premiojn en gravaj festivaloj. La aŭtorino mem estas honorigita per multaj literaturaj premioj, ĉar ŝi ekde 1990 loĝas en Israelo du el inter tiuj premioj estas aljuĝitaj en tiu lando: la premio Arie Dulĉin kaj la premio de la Unio de Israelaj Verkistoj. La verkistino havas specialan talenton ĝisfunde penetri la temon, kiun ŝi prezentas – ĉu temas pri persekutado de la kuracistoj-judoj (“Ljubka”), aŭ pri la pupfarantoj (“Sindromo de Petruŝka”), aŭ pri cirkaĵaj aktoroj (“Skribmaniero de Leonardo”) ktp... Ĝuste pro tio ĉiuj ŝiaj verkoj estas plenaj je vero, aldone ŝia neordinara verkista talento faras ilin ekstreme intrigantaj, atentokaptaj kaj legivokaj.

Leginte kelkajn verkojn de Dina Rubina mi ne povis kontraŭstari la deziron prezenti almenaŭ unu el tiuj al la esperantista legantaro. Tial, dank'al asisto de Amri Wandel, antaŭ jaro kaj duono mi konatiĝis kun ŝi koresponde. La interrilaton fortigis la persona konatiĝo: pasintnovembre Dina Rubina invitis min al sia aŭtora ves-

pero, okazinta en unu el millokaĵ salonoj de Sankt-Peterburgo. Post la prezentado formiĝis vicego de la dezirantoj ricevi aŭtografon, kaj mi preskaŭ perdis la esperon pri ebla interparolo. Tamen venis bona ideo proponi la aŭton por veturigi ŝin al la flughaveno, ĉar samvespere ŝi devis flugi al Moskvo. La propono estis akceptita, kaj mi ricevis la eblecon dum la unuhora veturado konversacii kun la verkistino. Rezulte estis ricevita buŝa permeso pri traduko de plej ŝatata de mi verko – la romano “La blanka kolombino de Kordovo”, kaj mi eklaboris.




Post dek unu monatoj la laboro estas finita, kaj estas ricevita skriba eldonpermeso de la aŭtorino. Mi esperas ke la iniciatinto de la eldono, pola eldonisto Tomasz Chmielik sukcesos aperigi la libron antaŭ la fino de marto 2020. Estante preskaŭ certa, ke mia espero realiĝos, mi kuraĝis inviti Dina Rubina al la onta ELI-kongreso en Tel Avivo por prezenti la libron, kaj ŝi donis sian principan konsenton.

HISTORIO: PROVO PRAKTIKE UZI ESPERANTON - DLT

Renato CORSETTI

La mondo ŝanĝiĝas tre rapide. Neniu nun memoras pri la 70-j jaroj, kiam komputiloj jam aperis, sed ankoraŭ mankis fidinda maniero sendi kaj ricevi informojn, mankis la nuna tutmonda reto, ĉiam pli potenca. Oni komencis revii pri homoj, kiuj antaŭ sia komputilo povos labori hejme en daŭra kontakto kun la centra komputilo de la firmao aŭ de la ministerio, por kiu ili laboris.



Tamen la unuaj retoj, tre limigitaj komencis aperi. Kaj oni komencis eksperimenti pri la novaj eblecoj. Multaj projektoj kun la adjektivo *Distributed*/Distribuita aperis ĉie. En tiu kunteksto juna nederlanda inĝeniero, Toon Witkam, eklaboris en la nederlanda programara firmao BSO (Buro voor Systeem-Ontwikkeling, en Utrecht).

Ĉar oni ekparolis tiam pri komputila tradukado, li kune kun kolego malkovris ke Esperanto pro sia strukturo prezentas pli grandan signifon-kvanton en malpli da literoj, do en malpli da komputila kodo. *La viruso formanĝis la liberan spacon - daŭrigotos en la sekva N...*

Norman Berdiĉevski

ATENCO EN KLAIPEDA

Esperantista historia fikcio teatrigita,

Personoj: esperantistoj loĝantaj en Klaipeda (1). Gerhard - germano, Werner - germano (frato de Gerhard), Icak - judo, Maria - polino, Kazimieras - litovo, Vytautas - litovo, prezidanto de Klaipeda Esperanto-Klubo. La tempo: inter 19 kaj 23 de marto 1939. Klaipeda (konata en la germana lingo kiel Memel) estas baltmara havenurbo.

Unua Akto.

En Esperanto-Klubo de Klaipeda.

Vytautas (pr. Vi'tautas): Gesamideanoj! Kun granda malĝojo ni estas devigataj malfermi ĉi tiun vesperan kunvenon en la ombro de tuj okazonta atako kontraŭ niaj amataj urbo kaj vivstilo. Ni devas alfronti la realon, ke post la okupacio la movado estos tuj malpermesita kaj multaj inter ni aŭtomate estos suspektataj kiel kontraŭregimuloj.

Multaj el vi jam kontaktis kun mi private dum la lasta semajno kaj konatigis vian starpunkton, ke la plej racia agmaniero estus, ke ni mem disiĝu anticipe. Tiukaze nian arkivon ni povas detrui aŭ transdoni al esperantistoj en Kaŭnas, en la sendependa Litovio. Tiel ni sukcesos malgrandigi la danĝeron por ni ĉiuj.

Ni voĉdonu pri la decido disiĝi kaj transdoni la movadan arkivon. Mi nur rekomendas, ke ĉiu membro mem konsultu sian konscion. La voĉdonado estos sekreta kaj la balotiloj nun estos distribuitaj. (ĝenerala murmurado)

Kazimieras (pr. Kazi'meras): Ĉu ni ne devus atendi, ĝis la litova registaro faros finan decidon pri la sorto de la urbo?

I'cak: Ĉu vi estas tiel naiva, Kazimieras?

Gerhard: Ni lasu fari la decidon per voĉdonado. Sed ni ankaŭ devas havi la rajton voĉdoni por ĉiumaniere kontraŭstari la naziajn rabistojn.

Vytautas: Vi pravas, Gerhard. Ĉiu samideano havas la rajton libere elekti inter la eblecoj. Ni komencu. Bonvolu enmeti la balotilojn en la urnon. (la voĉdonado daŭras kelkajn minutojn)

Vytautas: La rezultoj estas jenaj: 57 favore al tuja disiĝo, 19 favore al prokrasto de la decido ĝis la afero klarigos, kaj nur 2 favore al la rezisto ĉiakoste. Mi samopinias kiel la plimulto. Ĉi-okaze, bontrovo superas heroecajn, sed vanajn klopodojn. Kompreneble, la membroj, kiuj preferas agi alimaniere kiel individuoj devas fari tion tute aparte de la movado. Mi proponas, ke ĉiuj reiru hejmen kaj ne renkontiĝu en grupoj ĝis la nuna krizo forpasos. Samideanoj, - ĝis pli bonaj tempoj!

La plimulto de la membraro: ĝis pli bonaj tempoj!

Pli malfrue en la hejmo de Gerhard kaj Werner.

Gerhard: Mi antaŭvidis tion! Ni estis kaj restas eta grupo de strangaj, ridindaj netaŭguloj! Tion ni spertis ankaŭ dum la Hispana Civilmilito (2). Sed tamen kelkaj inter ni aperis kun armiloj en la manoj kaj baptis la verdan flagon per nia sango. Mi scias, ke tiaj vortoj indignas multajn samideanojn, kiuj konas nek kuglojn, nek armilfumon. Tiuj idealistoj ankoraŭ revas kaj kredas ke ni ĉiam kapablos teni nian flagon pura. Sed ni supervivos nur, se ni pretas rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante stari kontraŭ niaj malamikoj.

Icak: Ni ĉiuj admiras vin kaj Werner, sed kion povas fari eta ŝtato kiel Litovio kaj la tuta Esperanto movado kontraŭ la hitlera militmasino? Nenion! La plej grandaj potencoj - Francio kaj Britio ne kontraŭstaris la naziojn. Ili jam oferis Ĉeĥoslovakion, kies armeo pretis lukti kaj estis centfoje pli forta ol la litova.

Maria: Ne ekzistas dubo, ke Dancigo (3) staras proksime sur la listo de germanaj venkoj - poloj tie estas precize en la sama boato kiel ni! Sed kedu kaj fidu pri la heroa pola armeo. Pollando batalos kaj miloj da polaj esperantistoj partoprenos la batalon!

Icak: Mi tute malkonfidus kaj polojn kaj okcidentajn aliancantojn. Ili putras! Nur Sovetunio restas kiel fidinda barilo kontraŭ la faŝistoj.

Gerhard: Kiu estas naivulo? Ĉu vi jam forgesis kion ili faris en Hispanio? Lanti avertis nin, ke tiel kondutos la rusaj faŝistoj. Stalin

kaj Hitler estas similaj lipharaj frenezaj barbaroj. La ruĝa diktatoro ne evitos la neceson kvietigi la germanajn konkerantojn de niaj landoj, kiam li nur sentos propran avantaĝon. Ni fidu nenion! Nur drama evento povas revivigi veran internacian humanecan fratecon. La militanta esperantismo sukcesos inspiri bravajn kamradojn kaj kaŭzos la homaron taksi la movadon alimaniere - ne nur kiel anaron de stranguloj kaj viktimoj. Ni devas aliĝi al la rezistantoj kontraŭ faŝismo - per armiloj, ne nur per vorta rezisto!

Hitler baldaŭ gvidos novan triumfan motorkavalkadon tra niaj stratoj. Kia ŝanco por ni! Imagu, se li estos murdita ĉi tie - en la urbo, kiun la mondo kredas la plej malforta el liaj viktimoj! La urbo kie antinaziaj germanoj, judoj, litovoj kaj poloj ĉiuj esperantistoj, agas same - kaj faras kontraŭbaton en la eta Memel! Ni sendos fulmofajron, kiun la tuta mondo aŭskultos. Mi ĵuras ke la afero eblas! Mia frato Werner kaj mi preparis la komploton kaj pretas agi. Vi tri - judo, polo kaj litovo estas bezonataj por la plano kaj ni petas vian helpon. Pro tio ni ĉeestis la kunvenon kaj la sensencan voĉdonadon. Ni nur venis por konvinki vin aligi.

Kazimieras: Ĉu vi estas serioza aŭ freneza, Gerhard?

Gerhard: Absolute serioza. Imagu! Ni jam havas martirojn inter la falintoj de la Internaciaj Brigadoj (4). Nun ni havas la ŝancon ricevi seriozan konsideron de la grandaj potencoj kaj de la amasoj. Ni atingos pli per la atenco murdi Hitler ol per mil jaroj de agado kaj varbado. Eĉ se la plano fiaskos, ni restos famaj en la mondo, Esperanto ĝis nun nenion similan akiris en gazetoj.

Icak: Vi frenezas. Ne eblas. Ne estas eĉ imagebla. Se vi atencas murdon, la rezulto povas esti pli grandaj persekutoj de viktimoj - kiel okazis dum la "Kristallnacht" (5), kiam nazioj venĝis la atencon faritan de pola-juda junulo Grynŝpan.

Gerhard: Nia plano intencas anonci, ke la atencintoj estas germanoj, ke ni estas "memellandanoj" - anti-naziistoj, kiuj venĝas persekutojn kontraŭ Esperanto Movado. Sed nia venĝo estus eĉ pli grava, se estos konata, ke inter la atencintoj estas kaj judoj, kaj poloj, kaj litovoj, - ĉiuj klajpedanoj. Ni agos sole, se necesas, sed ni petas vian partoprenon. Se vi ne konsentas - ni petas nur vian silenton.

Maria: Sed kiel vi povas revii pri tia afero, kiam la granda plimulto de germanaj memellandanoj avide kaj fanatike deziras ripeton de la aŭstra-germana "Anschluss" - nova unuiĝo kaj kunfando de nia regiono

kun "Granda Germanio" (6).

Werner (pr. Ver'ner): Vi bone konas niajn "fratojn". Granda parto de la frenezo ŝuldas la kredon, ke Hitler estas nevenkebla. Ni povas bati la beston je ĝia argila kapo kaj renversi ĝin. Tiam la amasoj ekdubos kaj la militenkonduka vojo timigos ilin. La sukceso kaŭzos eviton de milito. Malsukceso kuraĝigos la kontraŭulojn, nenionfarado nur grandigos la apetiton de la besto.

Icak: Kiel eblas alproksimiĝi al Hitler, kiu estos ĉirkaŭita de armitaj gardistoj, dum vi troviĝos inter miloj da entuziasmegaj subtenantoj?

Gerhard: Ĝuste pri tio. Ni versajnos ankaŭ kiel frenezaj subtenantoj inter la amaso kaj plenumos la faron kaŝe. Ni ne intencas malkaŝi detalojn pri la komploto al vi, krom se vi pretas akcepti danĝerojn kaj mortriskojn; se ne - bonvolu nur silenti.

La klarigoj:

(1) Klaipeda (pr. Klaj'peda, Memel en la germana) - sola marhaveno de Litovio. En 1252 jaro germanaj militordenoj okupis tiun lokon kaj konstruis la kastelon Mummelburg, poste renomitan Me'mel kaj vastigintan je urbo. En 1923 ĝi estis redonita al Litovio. Post ultimato al Litovio 23an de marto 1939 en la urbon enmarŝis germana armeo kun solena elpaŝo de Hitler. La sendependeco litova estis ekstermita. La 28 de januaro 1945 Klaipeda estis rekonvertita de sovetia armeo. En Klaipeda-Memel antaŭ la hitlera reĝimo estis relative forta Esperanto-movado.

(2) Hispana Civila Milito daŭris 1936-1939. Ĝin komencis generalo Franko kontraŭ la registaro de Hispanio, konsistanta el maldekstraj partioj. La generalon subtenis faŝismaj statoj Italio kaj Germanio, la maldekstran registaron - Sovetunio kaj volontuloj (c. 42 000 el 54 landoj, inter ili ankaŭ el Litovio). Inter la volontuloj estis ankaŭ esperantistoj.

(3) Dancigo (germane Danzig, pole Gdansk) - granda havenurbo ĉe Balta maro, inter 1807-1815 kaj 1919-1939 havis statuson de libera urbo. En 1939 ĝi estis okupita de hitlera Germanio. Depost 1945 apartenas al Pollando.

(4) Internaciaj Brigadoj estis nomataj militaj batalionoj, formitaj el eksterlandaj volontuloj dum Hispana Civila Milito.

(5) Kristallnacht (en la germana - "kristala nokto") okazis 1938 11 09

dum kiu hitleranoj detruis 177 judajn preĝejojn, 7 500 judajn entreprenojn, multaj miloj da judoj estis enkarcerigitaj aŭ mortigitaj. Tio estis komenco de amasa ekstermado de judoj en Germanio.

(6) Anschluss (germane - aligo; pr. An'ŝlus) estis nomita anekso de Aŭstrio al la hitlera Germanio en 1938.

Daŭrigota en "Israela Esperantisto" - 170

KONTRIBUO DE UKRAINIDEVENAJ JUDOJ POR ESTABLO DE ISRAELO (la tria, fina parto)

EŬGENO RATNER (Johano, "Ĵen'ka")
1891 - 1965

Li naskiĝis en Odeso en asimilita familio de Haim Ratner kaj Ester Perc. Li finis la Teknologian instituton en Karlsruhe (Germanio) en la fako "arkitekturo". Komence de la Unua Mondmilito li revenis en Rusion kaj militservis en la cara kaj poste - en la Ruĝa Armeo. En 1923 Ratner venis en Palestinon kaj enposteniĝis kiel profesoro en la haifa Tekniono. Ekde 1930 kaj ĝis 1963 li gvidis arkitektan fakultaton en la Tekniono. En 1929 li estis membro de haifa komitato de Hagana, kaj partoprenis en defendo de judaj kvartaloj de Jerusalemo kontraŭ atakoj de arabaj ekstremistoj. De la 1938-a jaro estis estro de stabo de "Hagana". En jaroj de la Dua Mondmilito li kunordigis agojn de "Hagana"-taĉmentoj kaj "jiŝuva" kun gvidantoj de brita armeo en la Proksima Oriento.



ŜMUEL DAJAN (Kitajgorodskij)
1891 - 1968


Li naskiĝis en 1891 en urbeto Ĵaŝkov (Kijiva gubernio). Politika aganto de juda "jiŝuvo" en Palestino. Li estis unu el fondintoj de la kibuco "Deganio" kaj moŝavo "Nahalal". Ŝ.Dajan estis deputito dum la unuaj tri kadencoj de la Kneset, kaj la vicestro de Kneset de la tria kadenco. Li estis pat-



ro de la israela militgvidanto Moŝe Dajan kaj avo de kelkaj famaj israelaj kultur- kaj politik-agantoj, inter kiuj estis politikistino Jael Dajan, general-majoro Uzi Dajan, skulptisto Udi Dajan, reĝisoro kaj aktoro Asi Dajan kaj aŭtoro de multaj kantotekstoj Jonatan Gefen. Pranepo de Ŝ.Dajan estas kulta israela rok-kantisto Aviv Gefen.

PETRO (PINĤAS) RUTENBERG
(PINĤAS BEN-AMI)
1878 - 1942

Li naskiĝis la urbo Kremenĉuk (Poltava provinco), lernis en juda lernejo, poste finis teknikumon kaj studentigis en Peterburga Teknologia Instituto, kie li partoprenis en studenta revolucieca agado, pro kio li estis forpelita el la instituto kaj sendita al Jekateroslavo (nuna Dnipro), kie li laboris kiel desegnisto en metalurgia uzino. Petro enamiĝis al revoluciema Olga Ĥomenko. Por la edziĝo li devis kristaniĝi. Rutenberg sukcesis fini la instituton, kaj laboris kiel inĝeniero en grava peterburga uzino. Poste li revenis al la judaismo plenuminte proprainiciate mezepokan severan pentan riton (39 vipbatoj ĉe sojlo de sinagogo - la cikatroj restis por la tuta vivo kaj li fieris pri ili). Poste Rutenberg proksimiĝis al Ĵabotinskij kaj Trumfeldor en kreado de juda milita organizaĵo. En la jaro 1915 li veturis



Elektrstacio de Tel-Avivo

al Usono, kie li okupiĝis pri formado de juda legio, eldonis en la jida libron “Nacia renesanco de la juda popolo” (verkita dum restado en Italio en la rusa, sub pseŭdonomo Pinĥas Ben-Ami). En Usono li projektis detalan planon pri irigacio de Palestino kaj uzo de hidroenergio. Efektivigo de tiu plano fariĝis lia revo. Post la februara revolucio en la jaro 1917 Rutenberg revenas en Rusion, kie lia sampartiano “esero” (social-revoluciisto), estro de la Provizora Gvidantaro de Rusio, Kerenskij postenigas lin al vicestro de Peterburgo. La 7-an de novembro dum sturmo de la cara Vintra Palaco Rutenberg defendas rezidejon de la Provizora Gvidantaro pro kio li estis arestita kaj ĝis la jaro 1919 estis en prizono. Post

la revolucio kaj la Civitana Milito Rutenberg revenis al la ideo pri elektrifizo de Palestino. Petro Rutenberg restis en memoro de la posteuloj ne kiel aktiva revoluciisto, sed kiel homo, kiu alportis lumon kaj energion al Tel-Avivo, Haifo, Jerusalemo kaj tuta Israelo. En la jaro 1932 laŭ projekto de Rutenberg ekfunkciis hidroelektrostacio Naharaim, kiu tiutempe plene kontentigis Israelon pri elektroenergio.

GOLDA MEIR **1898 - 1978**

Ĉi tiu virino, la 5-a ĉefministro de Israelo, ministro pri internaj aferoj de Israelo, ministro pri eksterlandaj aferoj, ministro pri laboro kaj sociala prizorgo de Israelo, naskiĝis en Kijivo (ĉefurbo de Ukrainio), kreskis en Usono, dediĉis sian tutan vivon al Israelo, estas respektata nun ne nur de judoj el tuta mondo, ŝin estimas prezidentoj, politikistoj kaj ĉiuj, por kiuj vortoj “mia lando” estas ne nur vortoj.




Estas vaste konata anekdoto pri interparolo de Golda Meir kaj Henri Kissinger, en kiu ŝi provis persvadi lin fari Israelon kiel ĉefa prioritato, al kio li respondis: “Unue, mi estas civitano de Usono, due, la ŝtata sekretario kaj nur trie - judo”, al kio ŝi respondis: “En Israelo ni legas de dekstro al maldekstro”.

Jen estas kelkaj aforismoj de G.Meir: “Homo, kiu perdas honeston, perdas ĉion”, “Ĉu pli bonas virinoj ol viroj, mi ne povas diri. Sed ili, certe, ne pli malbonas”, “Ni ne ĝojas pri la venkoj. Ni ĝojas, kiam estas rikoltita nova speco de kotono, kaj kiam floras fragujoj en Israelo”. “Se homo volas havi propran landon kaj volas tion el tuta koro, li devas esti preta al ĉio”. Jen estas kelkaj fragmentoj el libro de Golda Meir “Mia vivo”, kiuj tre bone karakterizas ŝin. Mi certas, ke multaj el vi bone scias pri ŝia agado, sed verŝajne ne tre multaj legis ŝian libron. “Multfoje en la vivo mi sentis tion: timon - senton, ke ĉio ruiniĝas, ke mi estas ne tia, kiel ĉiuj ĉirkaŭantoj. Kaj - instinkte profunda certeco: se vi volas resti viva, vi devas ion mem entrepreni”.

“La ŝtato Israelo! Miaj okuloj pleniĝis de larmoj, la manoj tremis. Ni akiris. Mi faris judan ŝtaton reala kaj mi, Golda Maboviĉ-Meirson,

ĝisvivis tiun tagon. Io ajn okazu, kiun ajn koston tio havus, ni reaperigis la Judan Patrujon!” “La revo efektivigis - tro malfrue por savi pereintojn en la Katastrofo, sed ne tro malfrue por la estontaj generacioj. Kvindek jarojn antaŭe, post la Unua Cionisma Kongreso en Bazelo, Teodoro Herzl skribis en la taglibro: ‘En Bazelo mi fondis la judan ŝtaton. Se mi dirus tion hodiaŭ - tio vokus ĝeneralan ridon. Povas esti post 5 jaroj - kaj sen ajnaj duboj, post 50 jaroj - tion vidos ĉiuj’. Ĝuste tiel okazis”

Memortabulo sur loko de la domo, en kiu naskiĝis Golda Meir en Kijivo. Sur ĝi estas skribita (en ukraina lingvo):
 Ĉi tie ĝis la 1903 jaro loĝis elstara ŝtata aganto de Israelo
GOLDA MEIR
 1898-1903



JICHĀK BEN-CVI (ŜIMŜELEVIĈ)
dua Prezidento de Israelo 1952-1963



Li naskiĝis en ukraina urbo Poltavo kaj estis unu el la fonditoj kaj lideroj de socialisma direkto en cionismo, ĥaluc-movado kaj juda memdefendo en Rusio kaj Erec-Israelo.

Li grave kontribuis al studo de vivo de judaj komunumoj en Azio kaj Norda Afriko, ankaŭ esploro de historio de judoj en periodo de turka regado en Erec-Israelo. La unuan fojon Jichak Ben-Cvi estis elektita kiel Prezidento de Israelo en 1952 jaro. Li

dufoje estis reelektita en la jaroj 1957 kaj 1962. Li restis en la posteno ĝis fino de la vivo.

MOŜE ŜARET (ĈERTOK)
La dua ĉefministro 1954-1955.

Li naskiĝis en 1894 en urbo Ĥerson (suda Ukrainio), lia patro - Jakov Ĉertok, estis inter la unuaj aktivuloj de BILU. M.Ŝaret havis gravan meriton en establo de la ŝtato Israelo. Dank'al Ŝaret sur posteno de mi-



nistro pri eksteraj aferoj estis lanĉita altprofesia diplomataro; estis lanĉitaj oficialaj politikaj rilatoj kun multaj ŝtatoj de Eŭropo, Azio, Afriko kaj Amerikoj; estis establita komercaj kontaktoj kun multaj el ili. En UNo kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, ankaŭ en tutmondaj kaj regionaj forumoj estis defendataj gravaj interesoj de Israelo.

EFRAIM KACIR (KAĈALSKIJ)

La kvara Prezidento de Israelo
(1973-1978).

Li naskiĝis en 1916 en Kijivo. Biofizikisto, profesoro, kreis kaj dum 24 jaroj estris biofizikan fakon en Instituto nome de Weizmann, estante samtempe komence profesoro pri biofiziko en Hebrea Universitato kaj poste ĉefa scienca eksperto en la Defendministerio. Kiel sciencisto E.Kacir grave kontribuis al esplorado de proteinoj kaj ties strukturaj elementoj - aminoacidoj. Pro liaj sciencaj meritoj li ricevis premion de Weizmann (1950), la Ŝtatan Premion de Israelo (1959), de Rotŝild (1960). Krome li ricevis diversajn premiojn kaj medalojn en multaj landoj, inter kiuj estis Germanio kaj Japanio.



LEVI EŜKOL (LEO ŜKOLNIK)

La kvara ĉefministro de Israelo (1963-1969)

Li naskiĝis en urbetto Oratov (Kijiva provinco) en la 1895 jaro. En 1950-52 L.Eŝkol estis trezoristo en la Juda Agentejo. En 1951 li estis ministro pri agrikulturo kaj evoluo, en 1952-1963 - financministro. Sur tiu posteno li difinis ekonomian politikon de la lando kaj multon faris por evoluo de ĉefaj branĉoj de la israela ekonomiko. L.Eŝkol estis grava persono la en israela politika vivo. Kiam li fariĝis ĉefministro kaj ministro pri militdefendo, li faris ĉion eblan por defendo de la lando.

La brila venko en la Sestaga Milito, estis sekvo de Eŝkol-politiko, kiel ĉefministro de Israelo.



NASKIĜIS KAJ VIVIS EN UKRAINIO
(Resumo)

**Prezidentoj kaj ĉefministroj
de Israelo**

Jichâk Ben-Cvi - Poltavo
Efraim Kacir - Kijivo
Levi Eŝkol - Kijiva provinco
Golda Meir - Kijivo
Moŝe Ŝaret - Ĥersono

**Politikaj agantoj, cionistaj
lideroj, militistoj de juda
legio, aktivuloj de ĥaluc-
movado**

Ĥaim Arlazorov - Romni
Aĥad ha-Am - Skvira
Israel Bar-Jehuda - Konotop
Israel Belkind - Ĥarkivo
Ber Boroĥov - Zolotonoŝa
Roza Ginzberg - Kijivo
Aharon David Gordon - Trojanovo
Meir Dizengoff - Ĵitomir, Odeso
Zina Dizengoff - Ĵitomir
Zeev Ĵabotinskij - Odeso
Avraham Zusman - Odeso
Eliezer Joffe - Ĥotin
Zalman Levontin - Kremenĉuk
Leo Mockin - Kijiva prov.
Maks Mandelŝtam - Kijivo
Jehuda Pinsker - Odeso
Pinĥas Rutenberg - Romni
Vladimir Tjomkin - Jelisavetgrado
Josif Trumpeldor - Kijivo
Avraham Usiŝkin - Dnipro
Josef Fajnberg - Simferopolo
Israel Fajnberg - Sevastopolo
Fanja Frizer - Kerĉo

Jehuda Ĥankin - Kremenĉuko
Jehoŝua Ĥankin - Kremenĉuko
Haim Ĥisin - Ĥarkivo
Aleksandr Cederbaum - Odeso
Jaakov Ĉertok - Ĥersono
Fanja Ĉertok - Nikolajevo
Jehiel Ĉlenov - Kremenĉuko
Menaĥem Ŝejnkin - Odeso
Adolf Ŝtand - Lvivo

Scienc- kaj kulturagantoj

Menaĥem Avidom - Stanislav
(Mahler-Kalkŝtein komponisto)
Ŝaj Agnon - Buĉaĉ
(verkisto, Nobelpremiito)
Moŝe Baraŝ - Ĉernovci
(israela kulturesploristo)
Zelig Brodeckij - Odeso
(matematikisto)
Henriĥ Brodi - Uĵgorod
(esploristo de mezepoka
literaturo en la hebrea)
Ĥaim Naĥman Bialik - Ĵitomiĥo
Jehuda Ŝaret - Hersono
Josif Glozman - Kijivo
(artesploristo, enciklopediisto)
Naĥum Gutman - Odeso
(pentristo)
Batĵa Liŝanskaja - Kijiva provinco
(skulptistino)
Jozef Rot - Brodi
(verkisto)
German Ŝapira - Kijivo
(aŭtoro de ideo pri Hebrea Uni-
versitato en Jerusalemo)

**Tio estis vojo al realeco, centjare longa.
Kune kun judoj el la tuta mondo ukrainidevenaj
judoj batalis por kreo kaj establo de la Ŝtato
Israelo, ĝia viviĝo, plifortiĝo kaj prospero!!!**



POETO, TRADUKISTO DE 4 LINGVOJ

Petro PALIVODA (naskiĝis en 1959) estas ukraina kaj Esperanta poeto, tradukisto. Liaj verkoj en la ukraina, la rusa, la germana lingvoj kaj originale en Esperanto, ankaŭ la tradukoj, aperis en pluraj ĵurnaloj, revuoj, almanakoj, antologioj en Ukrainio, Rusio, Litovio, Ĉeĥio, Slovakio, Svisio, Rumanio, Usono, Aŭstralio, Ĉinio, Kanado, Kostariko, Pollando, Turkio, Kroatio, Koreio kaj Hungario. Kaj nun ankaŭ en Israelo...



Revo

Lingvoscienco
Mi volus lerni
lingvon de animaloj kaj birdoj
de vento pluvo kaj suno
kaj paroli kun ili
ĉar ili scias ĉion.
sed mi ilin ne komprenas kaj silentas
kaj ne povante ŝanĝi la staton
mi parolas kun homoj -
ili scias nenion,
sed mi diras kaj aŭskultas
kaj, ne povante ŝanĝi la staton
mi revas pri lerno de lingvo
de animaloj kaj birdoj,
de vento, pluvo kaj suno

Mi revis,
kiam estis infano,
suprenflugi en la ĉielon,
almenaŭ per aeroplano
(aeroplano sin levas supren -
kaj ĉiuj ne povantaj flugi:
domoj, arboj kaj fostoĵoj kaj tiel plu -
iĝas tiel malgrandaj)...
...Aeroplano sin levas supren -
kaj ĉiuj ne povantaj flugi:
domoj, arboj kaj fostoĵoj kaj tiel plu
kaj tiu, kiu ne revis,
kiam estis infano,
suprenflugi en la ĉielon,
almenaŭ per aeroplano -
iĝas tiel malgrandaj.

Silento

Literoj, vortoj, prepozicioj,
ĉeestas interpunkcio,
vortordo perfekte korekta,
espero kaj ĝojo-malĝojo –
ĉio en sortimento.
En la silabinterplekto
parolas ni per silento.

Pordo

Infaneco...
Homoj surstrate
pri io debatas.
Estas pordo farbata
de l' suno orkolore.
Mi miras:
kiom da jaroj trakuris –
restis la pordo ora.

ANKAŬ TIEL POVIS OKAZI...

Tradukita de M.Lineckij

Foje mian korton venis nejuna laca hundo. Ĝi havis ĉirkaŭkolumon, estis gaja kaj aspektis sata. Do, mi komprenis, ke ĝi estas bone prizorgata kaj ne estas senhejma. La hundo venis al mi, mi gladkaregis ĝian kapon, poste ĝi sekvis min en la domon, malrapide trapasis la antaŭĉambron, kaŭriĝis en la angulo, suspiris kaj ekdormis.



La sekvan tagon ĝi venis denove, rigardis al mi en la korto, eniris en la domon, kaj ekdormis sur la sama loko. Ĝi dormis ĉirkaŭ unu horon. Tio daŭris kelkajn tagojn. Finfine por mi fariĝis interese kaj mi fiksitis al ĝia ĉirkaŭkolumo papereton kun tiu teksto: “Mi volus scii, kiu estas mastro de tiu ĉarma hundo kaj ĉu scias li/ŝi (alivorte vi), ke ĝi ĉiutage venas al mi por dormeti?”

La sekvan tagon la hundo venis denove kaj al ĝia kolumo estas fiksitita papereto kun la respondo: “Ĝi loĝas en domo, kie estas seso da infanoj, du el kiuj ankoraŭ ne havas eĉ tri jarojn. Do, ĝi volas simple ie dormeti. Eble ankaŭ mi iam povus veni por fari la samon, ĉu?”

INTERALIE...

Kiam virino diras, ke ŝi amas la infanojn pli forte ol la edzon – ne kredu! La infanojn ŝi povas lasi portempe ĉe la najbarino.
La edzon – neniam!

Vera viro estas tiu viro, kiu memoras naskiĝtagon de la amata virino, sed neniam scias, kiom da jaroj ŝi havas. Viro, kiu neniam memoras ŝian naskiĝtagon, sed ĝuste scias kiom da jaroj ŝi havas, estas ŝia edzo.

Traduko de M.Lineckij

JUDAJ POPOLAJ RAKONTOJ PRI LA REĜOJ DAVIDO KAJ SALOMONO (re-rakontitaj de Luiza CAROL)

La reĝo **Davido** estis fama poeto kaj muzikisto. Onidire, kiam li estis knabo, la onta reĝo estis humila paŝtisto kun bela voĉo. Sed li estis tiom aŭdaca kaj sprita, ke li kuraĝis alfronti la giganton Goliato, kiu estis la ĉefo de forta malamika armeo. Komence, la giganto malrespektis la knabon kaj ekridis kiam li aŭdis ke tiom malgranda kaj malsperta ulo kuraĝas lukti kun li. Davido rapide uzis sian simplan ŝton-ĵetilon kaj trafis la okulon de la giganto. Tiu sentis grandan doloron, perdis sian ekvilibron kaj Davido sukcesis mortigi lin. La tuta granda malamika armeo retiriĝis post tiu evento kaj longtempe ne plu kuraĝis reveni. La knabo Davido gajnis la respekton kaj la dankon de la reĝo Ŝaulo, kiu invitis lin al sia palaco. Iom post iom, la literatura kaj muzika talentoj de Davido igis lin fama en la tuta lando.



Kiam Davido estis tre juna kaj ankoraŭ ne fariĝis la reĝo de la lando, malamikoj persekutis lin en la montaro, proksime al Jerusalemo. La onta reĝo estis sola kaj havis neniun armilon. Li eniris iun groton por kaŝi sin. Ĉe la eniro al la groto, eta araneo tuj komencis teksti reton. Ĝi laboris diligente kaj rapide. Ĝis la malamikoj alvenis al la groto, la enirejo estis tute kovrita per la araneja reto. “En tiu ĉi groto ne indas serĉi lin” – diris la malamikoj – “Se li estus kaŝiĝinta ĝuste tie ĉi, la araneja reto estintus rompita.” Ili ne povis imagi ke okazis miraklo, kaj la aranejo kovris la enirejon dum nur kelkaj minutoj, por savi la vivon de la onta fama reĝo, poeto kaj muzikisto.

Onidire la reĝo Davido neniam forpasas. Li troviĝas ankaŭ nun en iu sekreta groto apud Jerusalemo, kie li dormas ĉirkaŭata de plej grandavaloraj juvelaĵoj. Li dormas sur veluraj kusenoj kaj apud li estas ora ujo kiu enhavas “la akvon de la vivo”. Foje en kelkcento da jaroj, dum nokto kun plena luno, la reĝo Davido vekiĝas. Malrapide, li etendas sian manon al la ujo por trinki la miraklan akvon. Sed pro maljuneco, li estas tre malforta, lia mano tremas kaj li ne sukcesas trinki. Post nur kelkaj sekundoj li ekdormas denove, kaj denove pasos kelkcentoj da jaroj ĝis li malfermetos siajn okulojn.

Se foje troviĝus apud li iu junulo kiu rapide portus la ujon al la buŝo de la reĝo... tiu reviviĝus kaj revenus al sia popolo, por ke la paco kaj la bona vivo regnu en la tuta lando kaj eĉ en la tuta mondo. Sed por ke okazu tia miraklo, nepras ke tiu junulo estu perfekte honesta kaj bonkora, deziranta neniun avantaĝon por si mem, celanta nur la bonon de sia popolo kaj de ĉiuj aliaj popoloj. Sen tiaj noblaj virtoj, neniu kapablus trovi la enirejon de la groto. Onidire antaŭ longe, la anĝelo kiu gardas la sekretan groton trovis iun junulon kiu meritis provi plenumi tian grandiozan taskon. Tiu anĝelo vizitis la junulon en sonĝo kaj diris al li, ke en la kazo de fiasko li ne plu povos eliri el la groto. Sed la junulo konsentis riski sian vivon por revivigi la reĝon Davido, kiu alportus pacon kaj kontenton en la mondon. La anĝelo gvidis liajn paŝojn ĝis la sekreta groto kaj enigis lin tien, ĝuste antaŭ la momento kiam la reĝo devis vekigi. La groto estis plen-plena je juveloj kaj grandvaloraj trezoroj, al kiuj la junulo eĉ ne rigardis. Sed super la seĝo de la dormanta reĝo, brilis granda diamanto, kiu fascinis la junulon. Liaj okuloj fiksiĝis al ĝi... kaj li perdis la momenton kiam la reĝo vekigis. Do li fiaskis, ĉar dum kelkaj sekundoj fascinis lin materia valorajo. Kaj neniuj scias kiam okazos denove simila ŝanco por la homaro... *Pri la reĝo Salomono bonvolu legi en IsEs-170...*

Lenke SZÁSZ estas Esperanto-verkistino el Transilvanio, instruistino pri la rumana kaj hungara lingvoj. Esperantistiĝis ŝi en la 1982. Ŝiaj verkoj aperis en revueto "Bazaro" (Rumanio). Ŝi gajnis premiojn en multajn literaturaj konkursoj. Jen estas unu el ŝiaj verkoj.



LA MEVINO

Ŝi maljuniĝis. Kiam la maro furioze atakas la klifojn kaj hurlas la tempesto, ŝi restas en sia ejo, ne eliras, ne flugleviĝas. Ŝiaj ostoj fariĝis rigidaj, la flugiloj malfortiĝis. Se la tempesto daŭras dum tagoj, ŝi eltenas malsaton. Kiam la ventego malfortiĝas, ŝi trovas mortintajn marajn estaĵojn sur la sabla bordo kaj pluvivas. En klifo ŝi havas groteton. Tie ŝi vivis, de kiam ŝi trovis vivoparon. Iam, antaŭlonge. Tie ŝi sidadis pacience sur ovoj, varmigis ilin per sia korpo ĝis kiam



eloviĝis la idoj. Ŝia koro varmiĝas pro la rememoro. La idoj estis belaj, kaj ŝi kaj la vivoparo junaj. Per la fortaj flugiloj ŝi leviĝis multfoje dum la tago, fiŝkaptadis kaj la predon metis en la ĉiam malfermitajn, malsatajn beketojn. Kaj la mevidoj kreskis, adoltiĝis, pariĝis kaj havis ankaŭ ili siajn idojn. La mevino fiere rigardis la gefilojn, la genepojn. Sed la tempo rapide pasis. Kiam ŝi maljuniĝis, kiam malfortiĝis? La vivo forflugis nerimarkite. Estas agrable rememori la junajn jarojn. Kiam ŝi estis sub la varmaj flugiloj de la patrino kune kun siaj gefratoj. Kiam ŝi ekaŭdis la susuron de flugiloj de la patro venanta kun fiŝeto en la beko. Kiam ŝi mem ellernis flugi, fiŝkapti, kuraĝe leviĝi super la maron, eĉ dum tempesto. Bele estis vivi. Kaj estas bone vivi ankaŭ nun. Aŭskulti la hurladon de la ŝtormo kaj rememori la tempon, kiam kun sia paro ŝi leviĝis super la ondegojn kun sovaĝaj krioj. Ili estis feliĉaj. Pasis la jaroj. Ŝi ne plu havis idojn kaj iutage ŝia paro ne plu revenis. De tiam ŝi estas sola. Printempe kaj somere la blua maro brilas sub la suno. Kvazaŭ arĝentaj skvametoj kovrus la sunbanitan ondaron. Tiam estas bele leviĝi, trovi ion manĝeblan sur la sablo aŭ marĝene de la arbaro. Ĉio manĝebla estas bona, ŝi ne plu revas pri freŝa ĉasaĵo. La pina arbaro bonodoras, la suno varmigas ŝiajn malfortajn flugilojn Vivi estas bone. Inter la kriadanta mevaro estas ankaŭ ŝiaj gefiloj, genepoj. En ili enestas ankaŭ ŝi kaj ŝia vivoparo. En idoj pluvivas la gepatroj. Nova printempo alvenis. Estas for la malvarmaj vintraj tagoj kun la morne griza ĉielo kaj malmulta nutraĵo. Printempo! En la roko super ŝia groteto ekfloris la flava sempervivo. Kiel tiu planto vivas ŝajne sen tero? En la fendeto de roko ĝia radiko trovis iom da tero. Ĝi ne estas sola. En alia rokfendeto floras alia planto kun bluaj floretoj. Bele estas vivi! Fojfoje ŝi vidas smeralde verdan lacerton sur la sunvarmigita ŝtono. Ĝi estas bela, kaj ŝi ne volas kapti ĝin. Estas bone havi iun vivan en la proksimo. Kiam ŝi estis juna, ŝi ne rimarkis tiujn floretojn, kaj la smeralde verda, gracia lacerto estis nur ebla predo por ŝi. La vivo estis ĉasado, kaptado, akirado de nutraĵo por ŝi, por ŝiaj idoj. Nun ŝi estas sola kaj bezonas malmulton. Nun ŝi malkovras ankaŭ la belajojn. Ili beligas, riĉigas ŝian vivon. Ŝi ne sentas sin malriĉa, soleca, kompatinda. Sufiĉas por ŝi, kiom ŝi havas. Ĉiu mateno, kiam ŝi vekiĝas, estas ne nur nova tago, sed kvazaŭ nova vivo por ŝi. Ja ŝi ne restis rigida en la groto por ĉiam, ŝi vivas kaj povas eliri eksteren, kie brilas la suno, brilas la maro kaj odoras la pina arbaro.

Vivi estas bone! Vivi estas bele!

El la libro "Viveroj", 2019

